

# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2001 numero 4-a: septembro / oktobro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude GACOND

## 3 gravaj kunvenoj

Oktobre 13, Bern, SES-kunsido de la grupgvidantoj

Enire novan jarcenton indas repensi niajn organizon kaj laboran sintenon, tial espereble al la alvoko de Bruno GRAF, la SES-prezidanto, pozitive respondos ĉiuj, kiuj provas diskonigi esperanton en sia regiono. Tutcerte pli konvena kunordigo de niaj fortoj estas dezirinda. (Vidu la paĝojn 6-9-ajn.)

Novembre 17, La Chaux-de-Fonds, Regiona SES-kultura sabato

La bibliotekistino Martine SCHNELLER demonstros, kiel ekde nun la kolektoj de CDELI estas interrete konsulteblaj. Claude GACOND raportos pri la konkuro inter diverstipaj projektoj de planlingvoj, kiu karakterizis la 20-an jarcenton. Kia estas la internacia realaĵo enire de la 21-a jarcento? Ĉu eble tutmonda du-lingvismo helpe de la interregistara angla kaj interetna esperanta lingvoj? Mireille GROSJEAN raportos pri la romanĉlingva situacio, kiun karakterizas la ekuzo de planita interromanĉa idiomio. Responde al demandoj Jean-Thierry VON BÜREN komprenigos, kion esperanto povas alporti al poligloto. (Vidu la paĝon 8-an.)

Decembre 8-9, ZÜRICH, Regiona SES-kultura semajnfino

La detalan programon de tiu renkontiĝo orientsvisa kun asembleo de Svisa Esperantista Junularo kaj kun serio da prelegoj aperos en la venonta numero de *SES informas*, sed jam rezervu la koncernajn tagojn en via agendo. (Vidu paĝojn 18-an kaj 30-an.)



# Rememorigilo

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-  
poŝto: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch).

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto,  
PF 301, 8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25.

Retpoŝto: [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch).

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des  
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.

Retpoŝto: [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch).

Elisabeth LAUPER, kasisto, République  
13, 2300 La Chaux-de-Fonds. ☎: 914 39

34. Retpoŝto: [elilauper@bluewin.ch](mailto:elilauper@bluewin.ch).

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj jun-  
ulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Ret-  
poŝto: [chiara-fp@bluewin.ch](mailto:chiara-fp@bluewin.ch).

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

## SES informas

### Redaktaj datlimoj

Numero 2001-5 (novembro-decembro):

20-a de oktobro.

Numero 2002-1 (januaro-februaro  
2002): 15-a de decembro 2001.

## Svisa kalendaro

### Septembre

26: Genève Conférence Claude Piron.

26: Zürich. Konferenco.

27: Basel: ESB-kunveno.

30: Chiasso. KCE: seminario.

### Oktobre

01: Lausanne: LES-kunveno

03: Wil: EKW-kunveno.

09: Zürich: FSZ-kunveno.

10: Basel: ESB-kunveno.

13: Bern: SES: kunsido de la grup-  
gvidantoj.

18: Luzern: LES-kunveno

20: Redakta datlimo por *SES informas*

27-28: La Ch-de-Fds KCE Ekumena  
monatfino.

### Novembre

05: Lausanne LES-kunveno.

07: Wil EKW-kunveno.

10: Luzern: SAEF: GERI-renkonto.

13: La Ch-de-Fds: studrondo.

13: Zürich: ESZ-kunveno.

15: Luzern LES-kunveno.

17: La Ch-de-Fds: Kultura sabato  
organizita de SES kaj CDELI.

27: La Ch-de-Fds: studrondo.

### Decembre

05: Luzern: LES Zamenhofa festo.

05: Wil: EKW Zamenhofa vespero.

08: Zürich: Asembleo de JES.

08-09: Zürich: Orientsvisa kultura semajfino organizita de SES kaj ESZ.  
11: La Ch-de-Fds: studrondo.  
15-16: La Ch-de-Fds. KCE: Hilelismo.  
15: Redakta datlimo por *SES informas*  
16: Lausanne: LES Zamenhofa festo.

## Jaro 2002

### Januare

07: Lausanne: LES-kunveno.  
08: La Ch-de-Fds: studrondo.  
18: Luzern LES-kunveno.  
19: La Ch-de-Fds CDELI studsabato.  
22: La Ch-de-Fds: studrondo.

### Februare

04: Lausanne: LES Ĝenerala kunveno.  
12: La Ch-de-Fds: studrondo.  
16: La Ch-de-Fds CDELI studsabato.  
20: Redakta datlimo por *SES informas*

### Marte

12: La Ch-de-Fds: studrondo.  
16: La Ch-de-Fonds: CDELI: Prelego de Renato Corsetti, prezidanto de UEA.

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 20-a de oktobro, por ke ili troviĝu en la taŭga rubriko kaj en la svisa kalendaro de "*SES informas*" 2001-5 (novembro-decembro).

## Redakta malfruiĝo

Tiu ĉi numero 2001-4 de *SES informas* aperas kun bedaŭrinda

malfruo, kies ĉefa kaŭzo estas malakurateco en la ricevo de la publikigitaj artikoloj. Montriĝas jaron post jaro, ke la redakta datlimo de la 20-a de aŭgusto estas nekonvena, ĉar tiam la plimulto de niaj korespondantoj ankoraŭ ferias aŭ apenaŭ revenis el siaj vojaĝoj. Venas de ili ĉefe urĝaj petoj iom pacienci por la ricevo de iliaj sciigoj.

Sed ĉi-jare aldoniĝis je mia flanko la funebro de mia bofratino Cosette SANDOZ. Ŝia subita morto la 15-an de aŭgusto kompreneble perturbis mian laborkalendaron.

Kiam fine mi ricevis la promesitajn informojn bedaŭrinde tre streĉan deĵoron mi havis ĉe CDELI pro urĝa devo translokigi kaj tial necese reordigi la kolekton de la brokantaj revuoj.

Fine nur meze de la septembra monato mi retrovis la necesan malstreĉon por povi kontentige plenumi mian redaktan taskon.

Venontjare mi aliigos la redaktajn datojn, por ke ili malpli koincidu kun feri-periodoj.

La redaktoro Claude GACOND



# Vivo de SES

## Estraro

### Kompletigo de la estraro

Post la subita demisio de Perla MARTINELLI vakis la itallingva reprezentanto. Tial ni ĝojas, ke Chiara FABBRI pretas transpreni tiun chi funkcion kaj tiel samtempe junigi la estraron. Ni bonvenigas ŝin kore kaj dankas pro ŝia kunlaboremo.

Chiara FABBRI naskiĝis en 1971 en Torino (Italio), kie ŝi lernis esperanton en 1993. Ŝi studis en la universitato kaj doktoriĝis pri la itala literaturo en 1996. Poste ŝi translokiĝis al Svislando, kie aktivas en JES kiel kasisto kaj edziniĝis kun Dawid POCHANKE. Ekde 1999 ambaŭ loĝas en Chur, kie ŝi estas instruisto de la itala lingvo, geografio kaj historio.

Bruno GRAF, la prezidanto.

### Pri Literatura Foiro kaj Heroldo de Esperanto

SES skribis la 14-an de majo al LF-koop la ĉi-sekvan leteron:

*Estimataj,*

*La jarkunveno de SES, okazinta la 7-an de aprilo en Bern, decidis,*

*ke la membroj havu la liberecon elekti abonitajn gazetojn aldone al SES informas kaj ke la abonprezo de LF ne plu estu inkludita en la jarkotizo. Tio signifas, ke individua libervola abono anstataŭos la kolektivan abonon de LF ekde 2002.*

*Sekve ni nuligas formale la interkonsenton 09-11-1998 inter LF-koop kaj SES. La kolektiva abono de LF ĉesos fine de la jaro 2001.*

*La kialoj por la nuligo estas diversaj: La jaraj kostoj de 4800 fr. iĝis tro pezaj. La membraro stagnas aŭ regresas. La propra informilo SES informas ampleksiĝis kaj kostas pli. Mankas mono por la informa laboro de la societo. Nur kvinono de la membraro deziras ricevi la revuon LF.*

*Laŭ farita enketo proksimume 30 membroj deziras plu aboni la revuon LF je rabatita prezo. Ni esperas ricevi de vi trionan rabaton kaj petas pri via oferto. Eblus procedi same por Heroldo, sed ni ne konas la nombron da interesatoj.*

*Fine rimarkindas, ke la nova solvo ne estas direktita kontraŭ LF.*



*Ni esperas daŭrigi la kunlaboron en formo pli adekvata.*

*Kun sinceraj salutoj.*

*Bruno GRAF, prezidanto*

Respondo de la 19-a de majo de LF-koop al SES:

*Estimata kolego,*

*Ni bone ricevis vian komunikon pri la ĉeso de la kolektiva abono por Literatura Foiro. Ĉio estas en ordo laŭ la kontrakto.*

*En nia Administra Komitato ni jam ekzamenis la aferon kaj venis al la konkludo, ke ek de 2002 ĉio iru laŭ la libera merkato. Tial fine de 2001 ni sendos al ĉiuj SES-anoj enpagilon de LF-koop per kio ili povas reaboni la preferatan periodaĵon, ĉu "Literatura Foiro" ĉu "Heroldo de Esperanto" aŭ ambaŭ, laŭ la koncerna abontarifo en Svislando.*

*Tamen, por premii ilian fidelecon, al ĉiuj SES-reabonantoj LF-koop donacos bonuson elspezeblan ĉe sia libroservo. Tio praktike egalas al la proponita rabato.*

*Tiun bonuson ni ankaŭ donos al novabonantoj kiuj estas membroj de SES en la espero, ke tio konvinkos kelkajn esperantistojn plu aliĝi al SES.*

*Kun sinceraj salutoj,*

*nome de LF-koop*

*Sonja BRUN, prok.*

## Prigazetaj informo kaj oferto

Kiel vi scias, la jarkunveno decidis rezigni pri la kolektiva abono al *Literatura Foiro* ekde 2002. Kiu deziras plu ricevi tiun ĉi revuon, tiu abonos ĝin individue ĉe LF-koop. Vi povas legi la tiurilatajn korespondaĵojn inter SES kaj LF-koop ĉi supre en tiu ĉi bulteno.

Dum la jarkunveno membroj deziris informojn pri aliaj preferataj revuoj. Mi esploris la demandon kaj kontaktis la Centran Oficejon de UEA. Eblus ricevi la revuon *Kontakto* kun rabato de 20%, se troviĝos minimume 6 abonantoj. La abonprezo estus Euroj 22,4. *Kontakto* estas dumonata soci-kultura revuo de TEJO, eldonata de UEA kaj redaktata de d-ino Sabira STAHLBERG. Tiu revuo ne informas pri la movado, sed pri plej diversaj temoj el la tuta mondo. Kelkaj artikoloj estas verkitaj en facila esperanto. Temas pri vere interesa revuo por ĉiuj niveloj, tre rekomendebla al niaj membroj kaj speciale al kursestroj kaj kursanoj. Vi povas peti numeron por ekzameno ĉe Dieter ROOKE, Aeussere Klus 14, 4702 Oensingen. Se vi estas interesita, bonvolu informi la prezidanton ĝis meze de oktobro: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen, telefone 031 921 44 59, rete

[bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch). Nepre profitu de tiu favora oferto. Ankaŭ ĝisnunaj abonantoj ricevos la rabaton, se ilin tion deziras.

Cetere konatiĝu kun novaj gazetoj kaj petu la gazetujon de Dieter ROOKE, aldonante CHF 1.80 en poŝtmarkoj. Li cirkuligas gazetojn kaj revuojn: ekzemple la revuon de UEA *Esperanto*, la sendependan internacian kulturalan magazinon pri politiko, ekonomio kaj kulturo *Monato*, la rusan socikulturalan revuon *La Ondo de Esperanto*, kaj aliajn.

Jen la adreso de la svisa peranto por aboni esperantajn gazetojn kaj revuojn: Ch. SCHEIDEGGER, im Schleedorn 6, Nenzlingen, rete: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).

La prezidanto: Bruno GRAF.

# Kunsido de la grup-gvidantoj Bern

## 13-an de oktobro

Porinforme ni anoncas la ĉi-sekvan kunvenon kun la espero, ke ĝi grupigos ĉiujn gvidantojn de esperanto-grupoj kaj eble aliajn interesatojn.

La redaktoro

Karaj estraranoj,

Mi enketis pri konvena dato kaj konstatas, ke sabate 13-an oktobro estas plej taŭge. Mi invitas la prezidantojn aŭ delegitojn de lokaj grupoj kaj de JES, same la estraron de SES, al tiu kunveno. Estas la momento kaj bezono por diskuti komunajn problemojn kaj por trovi solvojn. Vi trovas ĉi-sekve diskutpaperon.

Ni kunvenos en konferencejo Galaxy, Effingerstrasse 20, Bern, tie kie okazis la jarkunveno 2001 (aŭtejo subtere) 13h30-16h30. Libervola tagmanĝo je 12h00 en la restoracio.

Bonvolu informi min, se iu estas neatendite malhelpita.

Mi dankas pro la kunlaboremo kaj salutas kore

Bruno GRAF, prezidanto

## Diskutpapero por la prezidanta kunveno

Por ke la kunveno estu pli efika mi submetas al vi en antaŭo kelkajn pripensojn aŭ proponojn. Estus dezirinde, ke vi diskutu ilin kun via grupo en loka kunsido.

### Informado-varbado

Estas necese, ke ni regule informu pri esperanto, spite de nefavoraj cirkonstancoj. SES disponigas varbilojn je reduktita prezo. Kiu ne



varbas, tiu ne vendas. Unu el la celoj estus disdoni jare iun kvanton ĉe bona okazo, ekzemple nun lige kun la jaro de la lingvoj. La grupoj bonvolu raporti dum tiu kunveno pri agadoj kaj kursoj, tiel ke ni povos profiti de spertoj.

### Interligi ĉiujn

SES devus interligi ĉiujn esperantistojn en Svislando: ĉu membroj aŭ ne, abonantoj, apogantoj, interatoj, precipe ankaŭ membroj de lokaj grupoj, kiuj ne anas al SES. La novaj malaltigitaj kotizoj ekde 2002 faciligos tion. Kiu pagas kotizon, tiu rajtas voĉdoni dum la jarkunveno. Aliaj nur abonas la informilon *SES informas* aŭ kontribuas laŭvole. Koncepto pri kreota amikaro jam aperis en *SES informas* 2000/2, paĝoj 9/10.

Propono: SES, la lokaj grupoj kaj JES interŝanĝas la adresarojn. SES sendas al anoj de la grupoj kaj JES, kiuj ne estas membroj aŭ abonantoj de SES, unu-dufoje jare la informilon *SES informas*, kiu entenas nacilingvajn aldonojn. La grupoj kaj JES povus procedi simile. La ricevantoj estos pli informitaj, eble interesiĝos kaj foje aliĝos.

Modelo ESZ: Esperanto-Societo Zürich abonis por tiuj membroj, kiuj ne anas al SES, la informilon *SES informas* kaj pagas laŭ inter-

konsento sumon de CHF 375 al SES, tio estas plimalpli la duono de la kostoj (presado kaj afrankoj). Kun sendokostoj unuopa numero kostas ĉirkaŭ CHF 2. Ni pretas fari interkonsenton kun ĉiu alia grupo.

### Kombinitaj kotizoj

Dum la jarkunveno 2000 iu pledis por kombinitaj kotizoj de loka grupo kaj SES. Perla MARTINELLI plendis, ke la estraro ne studis tiun demandon. Ne temis pri decido, sed pri diskuto. La malaltigitaj kotizoj nun ebligus kombini kotizojn, sed ĉu vere estas bezono? SES iam havis kombinitajn kotizojn. Hodiaŭ la statuto konas nur individuajn membrojn, ne grupanojn. Ĉu lokaj grupoj dezirus havi kombinitajn kotizojn? Se jes, ili enkasigus ankaŭ la SES-kotizon kaj ĝirus la sumon kun listo al SES aŭ inverse.

### Demandoj aŭ deziroj de la grupoj

Ni traktos volonte dezirojn aŭ demandojn de la grupoj.

Bruno GRAF, prezidanto de SES

# Regiona kultura sabato organizita de SES kaj CDELI Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds 17-an de novembro

## Al la biblioteko per buso:

Por atingi la bibliotekon el la stacidomo, trafu la buson 4-a direkto "Hôpital" kaj petu la haltejon "Bibliothèque". Bileto aĉeteblas en la buso mem.

## Horaro:

09h00: Malfermo de la CDELI-salono kaj de la prelega salono Charles HUMBERT en la Biblioteko, strato Progrès 33. Troviĝos klarigoj pri la funkciado de la eniraj pordoj ĉe la biblioteka enirejo.

10h00: Grupiĝo en la salono Charles-HUMBERT kaj salutvortoj de Bruno GRAF, la SES-prezidanto.

10h15: Unua prelego:

Martine SCHNELLER, bibliotekistino: *Kiel interrete konsulteblas la kolektoj de CDELI kaj kiel funkcias la interbiblioteka pruntoservo.*

11h00-11h15: Kafumo.

11h15: Dua prelego:

Claude GACOND: *Karakterizaj momentoj de la lingvaj luktoj en la 20-a jarcento. Hegemonio de la interregistara angla super la aliaj etnaj lingvoj kaj de la interetna esperanto super la aliaj planlingvaj projektoj. Ekzameno de la nuna internacia lingva situacio enire de la 21-a jarcento.*

12h00-12h15: Paŭzo.

12h15: Tria prelego:

Mireille GROSJEAN-ROBERT: *Reago de la romanĉlingvanoj koncerne al la uzo pli kaj pli oficiala de planita interromanĉa idiomo.*

13h00: *Tagmanĝa paŭzo: kuna irado al najbara restoracio italeca.*

14h30: Kvara prelego:

*Kion alportas esperanto al poligloto.* Intervjuo de Jean-Thierry VON BÜREN far Claude GACOND.

15h15: Diskutoj.

16h00: Konkludaj vortoj de Bruno GRAF kaj irado en la salonon de CDELI por plua babilado dum temo adiaŭa.

17h00: Fermo de la CDELI-salono.

**Aliĝo:** Sian aliĝon oni sendu al Esperanto, Claude GACOND, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds per la aldonita poŝtkarto. Estos petata partoprenkotizo de CHF 10 por la kovrado de la organizkostoj. Senpaga por la JES-anoj kaj por studentoj.



# Donacoj

Donacoj en CHF al SES :  
Olivier AMREIN, Ecublens: 25;  
Guido APPIUS, Basel: 45; Arthur  
BAUR, Zürich: 10; David BÜHL-  
MANN, Prilly: 30; Arlette DI VETTA,  
Genève: 30; Pierre DORTHE, Lau-  
sanne: 20; Verena ELSNER, Zürich:  
5; Jean-Loup GAUDIN, FR-Ferney-  
Voltaire: 25; Mireille GROSJEAN,  
Les Brenets: 70; Gudrun IMFELD-  
STAMM, Lungern: 20; Walter  
KOBELT, Arbon: 5; Jean-Rodolphe  
LAEDERACH, Peseux: 20; Kapitano  
PARZIVAL, Biel: 5; Hans & Silvia  
REY, Zürich: 100; Daniel &  
Myriam SCHAUBACHER, Bern: 20;  
Madeleine STAKIAN, Onex:10;  
Olivier TZAUT, La Chaux-de-Fonds:  
20; Elsbeth WALDER, Meilen: 50;  
Suzanne WANNER, Plan-les-Ouates:  
30; Armin WEIDMANN, Uerikon:  
20. Sume: 560.

Donacoj en CHF por la Agado  
2003: Anonima: 100; Françoise  
BADOUX, Pully: 10; Charlotte  
BLANC MAILLARD, Vevey: 30; Ruth  
& Eort Joris VAN PUIJENBROECK-  
WALDER, Winterthur: 15; Richard  
SCHNELLER, St.-Gallen: 30; Elsbeth  
WALDER, Meilen: 50. Sume: 235.

Nome de SES la kasistino  
Elisabeth LAUPER dankas la registr-

itajn donacintojn pro ties malavar-  
eco.

## Pri la ĉinnumera alvoko

En tiu ĉi numero de *SES informas* kaŝiĝas pagilo al la poŝta konto de SES. Espereble pluraj legantoj pretos ree malavare apogi la aktiv-  
econ de SES per kontribuo al SES mem aŭ por precizigita celo, ekzemple favore al la projekto Ag-  
ado 2003, al CDELI, al la renaskiĝ-  
anta JES, ktp. Sufiĉas tion ĉi indiki sur la pagilo.

Oni konsciu, ke la realigo de niaj projektoj dependas ne nur de niaj laborfortoj, sed ankaŭ de la mono je dispono en la SES-kaso.

SES komencis dissendi sian organon al ĉiuj esperanto-parolantoj kaj ĉiuj lernantoj, kies adreson ni ricevis, kun la espero, ke tiu dissendo dinamismigos la esperantan vivon svisan. Ni dankas al la profitantoj de tiu ĉi dissenda agado pro ilia reago ĝenerale pozitiva, kiu esprimiĝis per dankaj mesaĝoj, per donacoj kaj eĉ per aliĝoj al SES.

Tiu dissendado valorigas la vivon de la lokaj kaj fakaj organizaĵoj, kaj tio atestas, ke informa aktiveco de SES ne vanas.

La kurs-gvidantoj profitigu siajn instruatojn pri la ricevblo de *SES informas* per livero al la redaktoro de la adresaro de siaj kursanoj. Tiel

la koncernatoj estos tuj informataj pri la esperanto-vivo en Svislando.

La menciita dissenda agado bedaŭrinde konas financajn limojn. Ĉiu konsciu, ke nur la SES-membroj, la abonantoj kaj la kontribuantoj povas profiti je tute regula ricevado de ĉiuj numeroj de *SES informas*. Al la aliaj adresoj ni direktas la informilon laŭ niaj monaj ebloj kaj laŭ la enhavo mem de la entenataj sciigoj.

Do kiuj ne estas SES-membroj, sed tamen deziras regule ricevadi ĝian informilon, tiuj esprimu tion per

monkontribuo. Kaj kiuj kontribuas per monsumo egala aŭ supera al la jarkotizo, tiuj ricevos voĉdonrajton okaze de partopreno en SES-kunveno. Tiel SES montras sian akceptemon al ĉiuj esperanto-praktikantoj kunlaboremaj.

Kaj kiuj ne deziras ricevi la informilon, tiuj simple revenigu ĝin al la redakcio per la indiko: "*Rifuzita*". Tiel ni povos elimini el nia adresaro la nelegemulojn de *SES informas*.

La redaktoro kaj la kasistino

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia  
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
Ø 032 967 68 55.

Retpoŝto: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

## Granda progreso

Pro pluraj pozitivaj kaŭzoj CDELI travivas tre pozitivan evoluon.

La unua kaŭzo estis en majo la vizito de Herbert MAYER, la

direktoro de la aŭstria Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Dum kunsido kun Jacques-André Humair, la direktoro de la Bibliotekoko de la urbo La Chaux-de-Fonds, li anoncis, ke IEMW atentigos la interretajn konsultantojn de siaj kolektoj pri la ekzisto de la kolektoj de CDELI. Kaj decidiĝis la reciprokeco fare de CDELI por la kolektoj de IEMW.

La dua favora evento estis la aktiva help-kontribuo de la bibliotekistino Martine SCHNELLER. Post prikompuita staĝo ŝi anoncis sian intencon veni helplabori en CDELI maje kaj junie. Malkovrante



la ekziston de bibliotekistino scianta esperanton kaj havantaj bonajn konojn pri interlingvistiko, Jacques-André HUMAIR anoncis, ke la biblioteko instalos du komputilajn laborlokojn en la CDELI-salono, se Martine SCHNELLER kapablos majstri la interbibliotekan RERO-sistemon. Ekde julio, dankal la efika instruo de la bibliotekisto Gérard DONZE, ŝi intimiĝis kun ĉiuj sekretoj de la RERO-katalogado, kaj jam ekde aŭgusto interretaj konsultantoj povis malkovri la ekziston de libroj de la CDELI-kolekto.

Tria favora puŝo estis la adopto fare de RERO de la unikoda karaktraro, kio ebligas skribi esperantajn vortojn kun ties supersignitaj literoj.

La malfondo de Gastejo Edmond PRIVAT, kiu venigis al la komunumo La Chaux-de-Fonds kelkajn milojn da frankoj favore al CDELI, kaŭzis kvaran favoran helpon por la instalado de la komputiloj.

Nur komence de la aŭtuno, kiam ĉio estos trovinta firman solvon, tiam la esperanta gazetaro estos oficiale informita, ke la projektita *"Bibliografio de esperanto kaj interlingvistiko laŭ la kolektoj de CDELI"* komencas realiĝi por interreta konsulteblo.

Konklude al tiuj ĉi klarigoj ni publikigas unuan raporton de la

nova humurplena kunlaborantino de CDELI.

Claude GACOND

## Kio plaĉas al mi en CDELI

Kio plaĉas al mi en CDELI estas ĉefe, ke ni tie neniam enuas. Ĉiam okazas io: vizito de iu, serĉado de io, evito de revuoj, kiuj tapiŝas la plankon (Tio ne estas ilia definitiva loko!), instruo, lernado, formika bibliotekista laboro, ktp.

Koncerne la vizitantojn mi ĝojas diri, ke laŭ mia mallonga sperto (Mi estas tie nur depost la 1-a de majo: la du unuajn monatojn senpaga kaj ekde la 1-a de julio salajrota), temas pri afabluloj, kiuj uzas tiel gravajn bazajn vortojn kiel *"bonan tagon"*, *"saluton"* kaj *"ĝis"*. Unu vizitanto eĉ asertis al mi, ke li kompetentas tiurilate en pluraj lingvoj. Estis por mi grandioza momento!

Sed la laboro mem de la bibliotekisto estas ankaŭ grandioza. Estas fakte grandioza amaso da ĉio (kaj dubinde ĉu troviĝas aliloke en la mondo tiom da esperantaĵoj arigitaj (Pliaj donacoj bonvenas!): libroj, broŝuroj, revuoj, manuskriptoj, leteroj, flugfolioj, diversaj divers-aĵoj...

Estas ankaŭ paŭzoj kaj instru-plenaj konversacioj, kiuj helpas min

readaptiĝi al la svisa vivo (mi estis for dum dudek jaroj). Ne malofte mi aŭdas pri svisaj konatoj (sur la esperanta kampo) kaj mi povis ekzemple konstati, kiel plej diverĝas la opinioj koncerne mian longtempan amikon Henri VATRE / BEAUPIERRE (mortinta en 1998). Tio pensigas min pri la senco de la vivo: kio ni estas sur la Tero, ktp.

Tamen kaj verdire, mi ne estas ĉi tie por pensi pri la senco de la vivo, sed por lasi mian nomon en la historio de la biblioteko kiel venkinton de la informadika katalogado. Ĝis nun ne eblis tion fari pro diversaj kialoj kaj demandoj, inter kiuj la jenaj:

- ✓ esperanto estas aparta seninteresa fako.
- ✓ esperanto estas grava fako, sed tro impona kvante, por ke ni povu esperi fari ion ajn.
- ✓ esperanto havas strangajn literojn.
- ✓ ĉu esperanto estas lingvo aŭ nur amuzaĵo de kelkaj neseriozuloj?
- ✓ ni ne havas monon.
- ✓ ni havas monon, sed mankas la taŭga persono.
- ✓ ĉu la serioza persono estas diplomita?
- ✓ ĉu la diplomita persono estas serioza?
- ✓ ĉu ŝi kuiras ĉine?
- ✓ ĉu ŝi estas vera bibliotekistino?
- ✓ ĉu la fakto, ke ŝi scipovas esperanton, ne povus malhelpi en la katalogado de esperantaj libroj (pro manko de ekstera objektiveco)?
- ✓ ĉu tiu kono de esperanto (kiu tamen ebligas supozi, ke ŝi estas iom stranga – se ne stulteta) ne estus malhelpaĵo

en la lernado de informadika katalogado?

Sed mi ja ne celas tedi vin per ĉiuj demandoj, kiuj metis al si kaj al ni la respondeculoj de la biblioteko. Nu, ili nun ŝajnas trankviligitaj: stranga mi estas nur iom (ne pli ol la aliaj bibliotekistoj) kaj, same kiel la evoluantaj simioj, mi kapablas refari tion, kion mi povis observi. La demando pri ĉina kuirarto fine estis flankenlasita, kiel senrilata kun la temo.

### *Nu, je via vico!*

Sidiĝu antaŭ via komputilo kaj serĉu per interreto: [www.rero.ch](http://www.rero.ch).

Nun kliku dekstre "*Neuchâtel catalogue BPUN/BVCF*" (aŭ eventuale elektu la kolektivatan katalogon "*virtua*").

Nu, pri kio vi interesiĝas? Pri ekspedicio per balono al poluso? Senprobleme! Vi tajpu "*ekspedicio*" aŭ "*balono*" aŭ "*poluso*" kaj poste vi indiku al via komputilo, ke ĝi bonvolu serĉi... Atendu momenton... ĝis venas la miraklo! En CDELI ĝuste ekzistas libro, kiu tute respondas al via intereso (la aŭtoro estas "*Andrée*"). Ĉu vi povas venigi ĝin hejmen. Nun ne, vi ne povas; ĉar ĝi estas nur unua ekzemplero registrata, kiu ne povas eliri el la biblioteko. Sed la libro povas venigi vin biblioteken kaj vi povas konsulti ĝin aŭ en CDELI aŭ



en la bela legoĉambro de la urba biblioteko.

Ja nur malmultaj libroj troviĝas nun en la "maŝino" (sistemo VTLS por Romandio kaj la Nacia biblioteko). Pro tio mi donas al vi kelkajn serĉideojn...

Aŭtoroj: *Bulthuis, Privat, Auld, Vatré, Andrée.*

Ŝlosil-vortoj: *alia, pasinteco, antologio, esperanta, Stafeto, enkonduko, Hago, pioniro...* Ne hezitu uzi ilin kaj aliajn laŭ via plaĉo!

Mi deziras al vi agrablan serĉadon kaj salutas vin... ĝis la venonta fojo, kiam venos pliaj klarigoj.

Martine SCHNELLER

## Venontaj studsabatoj

Pro la transformoj, kiuj nun pozitive karakterizas la vivon de CDELI, ĝis la 17-a de novembro ne okazos studsabatoj, kaj tiu novembra havos la karakteron de SES-regiona kultura sabato.

Jam nun ĉiu antaŭsciu, ke la sabaton 16-an de marto 2001 prelegos Renato CORSETTI, la nova prezidanto de UEA.

## Trista evento

Cosette SANDOZ-GIROUD, kiu helpadas ĉiumerkrede ĉe CDELI ekde pli ol dek jaroj zorgante pri

ordigo de revuoj, registro de katalogotaj libroj kaj broŝuroj kaj kontrolo de la kolektoj, subite mortis la 15-an de aŭgusto.

## Kuraĝiga helpo

Sed la laborseĝo de Cosette SANDOZ tuj retrovis sidanton. Nancy FONTANNAZ, kiu ĵus emeritiĝis el sia instruista funkcio, okaze de vizito en la hejmo de Claude kaj Andrée GACOND, ĉeestis la telefonan anoncon de la morto de Cosette SANDOZ. Ŝi decidis alporti sian helpon al CDELI. Jam la saman tagon ŝi venis helpi al la ordigo de revu-kolektoj kaj la sekvan vendredon 17-an de aŭgusto je la mateno de la funebro de Cosette ŝi revenis el Pully inaŭgure al la decidita ĉiusemajna helplaboro al CDELI.

Claude GACOND

André SANDOZ kaj Andrée kaj Claude GACOND dankas al la samideanoj, kiuj sendis amikajn vivsignojn, eksciante pri la subita morto de Cosette SANDOZ-GIROUD.

# JES

Junularo Esperantista Svislanda  
Jeunesse Espérantiste Suisse  
Junge Esperantisten der Schweiz  
Gioventù Esperantista Svizzera  
Giuventetga Esperantista Svizzer

c/o Vera POCHANKE  
Zurlindenstrasse 110  
8003 Zürich

Telefon-numeroj:

hejma: +41.(0)1.451.16.51

oficeja: +41.(0)1.255.25.37

lab: +41.(0)1.255.37.87

mobike: +41.(0)79.431.53.30

[veronika\\_p@hotmail.com](mailto:veronika_p@hotmail.com)

**JES lebt wieder !!!**

Hallo,

Dies ist eine Info für alle jungen EsperantistInnen der Schweiz. Vielleicht bist Du eine neue Esperantistin, vielleicht bist du ein 'altes' Mitglied von JES, dem aufgefallen ist, dass JES während den letzten zwei Jahren mehr oder weniger geschlafen hat.

Um unsere Organisation wieder zum Leben zu erwecken, habe ich beschlossen, alte Adresslisten von JES hervorzusuchen und sie mit neuen Mitgliedern zu ergänzen. Das Hauptziel ist, eine neue Liste der jungen EsperantistenInnen der Schweiz zu kreieren.

Dafür brauche ich Deine Hilfe. Bitte fülle den Antwortalon aus und sende ihn an die obenstehende Adresse. Ob Du Lust hast, ein aktives Mitglied zu werden oder nicht, spielt keine Rolle, es wäre ganz einfach gut zu wissen, wer sich in unserem Land für Esperanto interessiert.

Am 8. Decembre 2001 findet die Generalversammlung von JES statt. Wenn Du andere EsperantistInnen kennenlernen, mit ihnen diskutieren und abendessen möchtest, dann komm doch. Es sind alle ganz herzlich eingeladen! !

Ich warte auf Eure Antwort, Inspirationen und neue Ideen!

Bis bald,

Vera POCHANKE

**JES vit de nouveau !!!**

Bonjour à toutes et à tous,

Voilà une information pour tout jeune espérantophone en Suisse. Peut-être tu es une nouvelle espérantophone, peut-être tu es un ancien membre de JES qui a remarqué que JES s'était plus ou moins endormie pendant les deux années passées.

Pour réactiver notre organisation, j'ai décidé de retrouver des anciennes listes d'adresse de JES et de les compléter par de nouveaux membres. Le premier but est de



créer une liste actuelle des jeunes  
espérantophones en Suisse.

C'est pour ça que j'ai besoin de ton  
aide! Remplis et renvoie le talon de  
réponse à l'adresse mentionnée ci-  
dessus, s'il te plaît. Peu importe si tu  
désires devenir un membre actif ou  
pas du tout, il serait juste bien de  
savoir qui s'intéresse à l'espéranto  
dans notre pays.

Le 8 décembre 2001 aura lieu  
l'Assemblée Générale de JES. Viens  
si tu veux faire la connaissance  
d'autres espérantophones, discuter  
au sujet des futures actions de JES  
et souper ensemble. Tou(te)s sont  
les bienvenus(e)s !!

J'attends vos réponses,  
inspirations et idées nouvelles!

A bientôt,

Vera POCHANKE

## Junularo Esperantista Svislanda informas

Certe multaj rimarkis la silenton  
flanke de la junularo Esperantista  
Svislanda (JES) dum la lastaj du  
jaroj. Tiun malaktivecon kaŭzis  
diversaj kialoj. Multaj el la aktivaj  
membroj translokiĝis aŭ ŝanĝis la  
vicon aŭ forestis eksterlande dum  
unu jaro.

Nun tamen venis tempo por  
diskuti pri la estonteco de JES. La  
unua celo estas fari aktualan liston

de junaj esperantistoj en Svis-  
lando. Por tio ni bezonas vian  
helpon! Se vi konas junajn (ĉirkaŭ  
15-35-jarajn) esperantistojn, kiuj  
loĝas en Svislando, bonvolu tion  
sciigi al mi.

Por reorganizi JES kaj decidi  
komune pri ĝia agado ni preparas  
Ĝeneralan Asembleon, kiu  
okazos la 8-an de decembro en  
Zürich. kadre de la Orient-svisa  
Kultura Semajnfino. Ĉiuj interes-  
itoj kore bonvenas! Estos bela okazo  
por (re)konatiĝi kun aliaj esperant-  
istoj dum la diskutoj kaj la komuna  
vespermanĝo, kiun ni pretigos post  
la asembleo. La partopreno en la  
renkontiĝo estos senpaga por la ge-  
junuloj. Petu informojn ĉe: Vera  
POCHANKE, Zurlindenstrasse 110,  
8003 Zürich.

[veronika\\_p@hotmail.com](mailto:veronika_p@hotmail.com)

Kun via helpo ni certe retrovos  
junulojn interesitajn pri esperanto  
kaj povos reviiĝi JES!

## Belaj surprizoj dum la IJK en Strasburgo

La ĉijara Internacia Junulara  
Kongreso (IJK) okazis en  
Strasburgo de la 29-a de julio ĝis la  
5-a de aŭgusto. Ĉar mi ne havis  
ferion ĉisomere mi decidis parto-  
preni almenaŭ semajnfine la lastajn  
tagojn de la IJK. Ja estus stulte mal-  
trafi tiom proksiman kongreson.

La lasta IJK, kiun mi partoprenis, okazis antaŭ kvar jaroj, do mi pensis vidi nur nekonatajn al mi junulojn de la 'nova' generacio kaj mi iom timis, ke mi sentos min maljuna kaj ne plu apartenanta al la junulara movado. Sed kiom bela surprizo atendis min! Alveninte vendrede vespere ĉe la urba parko, kie okazis koncertoj de diversaj esperantaj grupoj, mi trovis amasojn da malnovaj amikoj! Multajn el ili mi ne vidis ekde pluraj jaroj kaj mia ĝojo despli grandiĝis. Rapide mi sentis min altirita de la bona etoso, kiu regis en la parko. Por mi estis iusence sento de reveno al la mondo, kiun mi longe ne plu spertis, kaj mi miris, ke ĝi daŭre ekzistas.

Alia surprizo estis renkonti svisajn junulojn. Ĉiuj entuziasmis pri mia plano revivigi la agadon de Junularo Esperantista Svislanda (JES). En la tradicia nokta teejo de la junularaj renkontiĝoj, la gufujo, ni kune priparolis la organizadon de la Ĝenerala Asembleo de JES. Ni antaŭĝojas revidiĝi decembre en Zürich kaj esperas, ke la agado de JES kreskos kaj altiros multajn junulojn. Tiam dum la venonta IJK certe estos pli da svisaj partoprenantoj kaj ni povos organizi komunan vojaĝon! Ni ankaŭ antaŭĝojas rekomenci la malnovan JES-tradicion: organizi skisemajnfinojn kaj aliajn renkontiĝojn. Oni vidas, ke parto-

preni en granda, etosplena kongreso donas fortojn por plulabori por la movado!

Vera POCHANKE.

## Mia unua kongreso

Post longa kaj bela biciklado tra Nederlando, Belgio, Germanio, Luksemburgo kaj Francio mi finfine alvenis du tagojn post la komenco de la 57-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) al ties kongresejo, la junulara gastejo de Strasburgo. Sed je mia surprizo preskaŭ neniu estis tie!

Iom poste aperis la ĉirkaŭ 400 junuloj el 35 landoj, kiuj partoprenis al la IJK. Kiel mi eksciis, ili ĵus revenis de la tuttagaj ekskursoj al diversaj lokoj kiel Freiburg en Breisgau, la Nigra Arbaro, muzea minejo, kaj aliaj vidindaĵoj. Dum la vespermanĝo mi interparoladis por la unua fojo esperante kun fremdlingvano. En la espero trovi ian internaciecon mi tuj estis maliluziigita, ĉar la interparolado kun la rusino de Sankt Peterburgo tute ne internaciumis. Ŝi parolis tiel nature, kaj mi tiel bone komprenis ŝin! Kvankam ankaŭ ŝi nur eklernis esperanton du jarojn antaŭe. Eble mankis la masko, eble la hipokriteco aŭ eble la malfacileco, kiujn mi konas de aliaj internaciaj renkont-



iĝoj. Eble mi mem ne sentis min sufiĉe fremda!

La merkredaj diskutrondoj kaj prelegoj helpis min kutimiĝi al tia malsama internacieco. Vespere mi havis ankoraŭ ŝancon aŭdi belan koncerton de JOMO, kiu jam koncertis lunde.

Ĉiutage okazis noktomeze dudek kulturaj minutoj en la gufujo, tre agrabla tetrinkejo. Unufoje ni kantis *francajn kantojn*, aliffoje ni aŭdis aŭstraliajn kantojn, kaj merkrede, Claude PIRON, kiu jam interese prelegis posttagmeze, prezentis kelkajn el siaj poemoj. Por la noktoj oni montris ĉiunokte filmojn, inter kiuj la fama filmo *“Chicken Run”* franclingve, kun esperantaj subtitoloj.

Krom la tuttagaj ekskursoj estis organizitaj tiom da aliaj ekskursoj, ke ne eblis partopreni al ĉiuj: Malkovradoj de Strasburgo piede kaj bicikle, vizitoj de la Eŭropa Konsilio, de la Eŭropa Parlamento, de bierfarejo, de potfaristo, vinstumado, vizito de Colmar, ktp.

Tamen la plej granda sukceso de la IJK estis la publika festivalo pri “artoj kaj lingvoj” je la fino de la semajno. Vendrede vespere okazis publikaj koncertoj de esperantaj grupoj sur scenejo en la “Parc de la Citadelle”. Sabate okazis samloke aliaj prezentadoj, internaciaj dancoj kaj koncertoj. Samtempe en kvin

tendoj estis prezentitaj 25 lingvoj esperantlingve kun franclingvaj tradukoj por la neesperanta publiko. Ja estas la eŭropa jaro de la lingvoj!

Jam alvenis la dimanĉo, kaj lacigite pro la mallongaj noktoj mi reveturis bazelen bicikle kompreneble!

Estis mia unua kongreso, kaj mi jam ĝojas revidi dum aliaj kongresoj tian tutmondan familion parolantan tiom da lingvoj.

Benno FRAUCHIGER, JES, Bazelo

## JES reviviĝas!!!

Saluton,

Jen informo por ĉiuj junaj esperantistoj en Svislando. Eble vi estas nova esperantisto, eble iama membro de JES, kiu rimarkis, ke dum la pasintaj du jaroj JES pli kaj pli dormis.

Por iom revigi nian agadon mi decidis trovi la malnovajn adreslistojn de JES-membroj kaj kompletigi ilin per novuloj. La unua celo estas fari aktualan liston de junaj esperantistoj en Svislando.

Tial mi bezonas vian helpon! Bonvolu plenigi kaj resendi la kunmetitan respondilon. Ne gravas ĉu vi emas aktivi aŭ tute ne, estus simple bone scii, kiu interesiĝas pri esperanto en nia lando.

La 8-an de decembro okazos Ĝenerala Asembleo de JES.

Venu, se vi ŝatus (re)konatiĝi kun aliaj esperantistoj, diskuti pri agado de JES kaj kune vespermanĝi. Ĉiuj kore bonvenas!! La partopreno estas senpaga por junuloj.

Atendante viajn respondojn, kaj ideojn, mi salutas vin ĉiujn.

Vera POCHANKE

## Ĝenerala Asembleo 2001 de JES

### Renkontiĝo:

- La ĝenerala asembleo de JES okazos la 8-an de decembro en Zürich.
- Ni kunvenos en la klubejo de Esperanto-Societo Zürich, kiu troviĝas ĉe Akazienstrasse 6 en 8008 Zürich (Tramo 2 + 4 ĝis haltejo Kreuzstrasse, supreniru la straton Kreuzstrasse, 2-a strato dekstre, paralele al Seefeldstrasse).
- La asembleo komenciĝos je la 14h00.
- Rendezuo por ĉiuj, kiuj alvenos trajne estas je la 13h30 ĉe la renkontiĝpunkto de la ĉefstacidomo de Zürich.

### Tagordo:

1. Resumo pri la nuna stato de JES. Memorigo pri la lastjaraj okazintaĵoj (lasta Ĝenerala

Asembleo, protokolo, komitato, financoj kaj renkontiĝoj).

2. Decido pri formo de nova komitato kaj ĝia elekto.
3. Decido pri formo de bulteno:
  - Rubriko en *SES informas*.
  - Informoj sendataj rete.
4. Financoj / Buĝeto.
5. Fikso de jaraj kotizoj.
6. Fikso de oficiala JES-adreso.
7. Eventualaj modifoj de la statuto.
8. Renkontiĝoj (skisemajnfino, kunvojaĝo al internaciaj renkontiĝoj, ktp.)
9. ttt-paĝoj.
10. Kursoj, propagando.
  - Kunlaboro kun lokaj grupoj. Esperanto-klubo de EPFL en Lausanne.
  - Esperanto-Societo Zürich.
11. Aliaj proponoj kaj diversajtoj.

### Proponoj:

Bonvolu sendi ĉiujn eblajn indikojn, proponojn, instigojn, diskutindaĵojn, ktp. al: Vera POCHANKE, Zulindenstrasse 110, 8003 Zürich.

[veronika\\_p@hotmail.com](mailto:veronika_p@hotmail.com)

### Vespera programo:

Ni planas kune vespermanĝi (ekzemple prepari fonduon) post la asembleo. Laŭ deziroj ni uzos la vesperon por sperti "noktan vivon" de Zürich. Kiuj ŝatus tranokti en Zürich, tiuj bonvolu tion sciigi al Vera antaŭe.



# KCE

Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds.  
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.  
kce.esperanto@bluewin.ch

## Raporto

### Jubileo de Waringhien

La 29an de julio Gaston WARINGHIEN estus ĝinta centjara. KCE inaŭguris tiun jubilean jaron per junia monاتفino gvidata de du elstaraj prelegistoj kaj varingjenologoj: Michel DUC GONINAZ kaj Perla MARTINELLI. La sukcesa aranĝo estis aparte dediĉita al la poeto, kiu verkis sub la pseŭdonimo G. E. Maura, la aŭtoro de "*Duonvoĉe*". La identecon de tiu ĉi "panama" poeto (en la pariza slango "Panama" signifas "Parizo") malkovris Michel DUC GONINAZ mem. Li klarigis ankaŭ la devenon de la pseŭdonimo: G. el Gaston kaj E. Maura el Marthe Remau, la esperantistino, al kiu Gaston estis ame ligita en la 30-aj jaroj. Sed plie Michel Duc GONINAZ malkovris ke Gaston WARINGHIEN estas ankaŭ Georgo Peterido PENETER, kun-

aŭtoro (kun Kálmán. KALOCSAY) de la "*Libro de Amo*".

La ĉeestantoj, el Francio, Italio, Kubo, Nederlando kaj Svislando, havis la privilegion vidi specimenojn el la reviziita PIV: certe la verko estos eldonita okaze de la varingjena jubileo, verŝajne jarfine. Tamen necesas, ke privatuloj kaj libroservoj urĝe sendu al SAT siajn antaŭmendojn.

Dek jarojn post lia forpaso (20-a de decembro 1991) la verkaro de Gaston WARINGHIEN restas ekstreme aktuala. Tiu verkisto estis kaj restas la homo, kiu plej multe influis nian lingvon post L. L. ZAMENHOF. KCE dediĉis al li zorge de Giorgio SILFER kaj Ljubomir TRIFONCHOVSKI la literaturan kurson de 14-20-aj de aŭgusto, specife pri la temo "WARINGHIEN la eseisto".

### Muzika kulturo en la 90-jaroj

Inter la 24a kaj 29a de julio disvolviĝis semajnfino gvidata de Floreal MARTORELL dediĉita al la muzika kulturo en esperanto dum la lastaj dek jaroj. La kurson aliĝis muzikemuloj el kvin landoj kaj tri kontinentoj. Dum tiu kurso ni ekkonis ne nur la plej novajn rokbandojn, sed ankaŭ la historion de esperanto-muziko ekde la apero de la unua disko el la periodo inter la du mondmilitoj. Ni sekvis la

evoluo de la teknikaj rimedoj kaj ankaŭ de la diversaj muzik-tendencoj. Kun plezuro ni aŭskultis specimenojn el produktoj de multaj artistoj. Pro la tre bona etoso kaj altkvalita prelego, ni esperas, ke en la proksima estonto ni povos reinviti Floreal MARTORELL por daŭrigi la seminarion kun la sama entuziasmo.

#### 4a somera sesio de Plurnivela Internacia Kursaro

Post la sukcesa paska sesio, ekde la 31-a de julio ĝis la 20-a de aŭgusto disvolviĝis la 4-a Plurnivela Internacia Kursaro por ĉiuj gradoj. Al la trisemajna kursaro aliĝis dudeko da studemuloj venintaj el 7 landoj kaj 3 kontinentoj. La komencantojn instruis la hungarino Agnes VERRASZTO kaj la progresantojn Stano MARCHEK el Slovakio. Por la supera grado prelegis: dum la unua semajno pri redaktado d-ro Giorgio SILFER, dum la dua semajno pri sociologio d-ro Walter ZELAZNY, dum la tria semajno pri la historio de esperanto-literaturo d-ro Giorgio SILFER kaj omaĝe al Gaston WARINGHIEN s-ro Ljubomir TRIFONCHOVSKI el Bulgario.

Ĉiusemajne ni havis ekskursajn tagojn, kaj tre interesajn kulturajn programojn preskaŭ ĉiuvespere. Kelkfoje ni spektis video-filmojn en esperanto. La ĵurnalo "*L'Impartial*" okaze de PIK aperigis du pozitivajn

artikolojn pri la aktiveco de la Centro, kun kolora foto, kiu altiris la atenton de la franclingva legantaro.

## Kurso pri Jogo

Ekde la 21-a ĝis la 26-a de aŭgusto, jam trian fojon sub la lerta gvidado de Fernando VURPILLOT, okazis la antaŭvidita kurso, kiu konigas al la partoprenantoj la bazajn esprimojn de Jogo, kaj ebligas praktiki interesajn ekzercojn.

Anna LASZAY

## Kunvenoj

### Septembre 30

La dimanĉon 30-an de septembro okazos en Tiĉino, kaj precize en la landlima urbo Chiasso, renkonto kun la aŭtoroj de la verkata "*Historio de la esperanto-literaturo*". La seminario daŭros de la mateno ĝis la vespero. La aŭtoroj de la verko estas prof. Carlo MINNAJA kaj d-ro Giorgio SILFER.

### Oktobre 27

La sabaton 27-an de oktobro, de la mateno ĝis la vespero, okazos ĉe KCE la Ekumena Monاتفينو, kun la partopreno de pastroj Adolf BURKHARDT kaj Bernhard EICHKORN. La aranĝo komenciĝos



jam la vendredon vespere, kun koncerto en preĝejo. Estas antaŭvidita ankaŭ ekumena diservo.

Anna LASZAY

## Decembre 15-16

La 15-an kaj 16-an de decembro kunvenos la Hilelista Asocio, kun zamenhofologiaj prelegoj.

## Esperantologia Fakultato

La retinformilo "Heroldo Komunikas" en sia numero 131-a dissendita la 5-an de septembro alportis tiun ĉi sciigon pri projektado de Esperantologia fakultato:

*La Kultura Konsilio de KCE aprobis la projekton de Esperantologia Fakultato, ellaboritan surbaze de propono de d-ro Giorgio SILFER. La projekto iros al la Asembleo de KCE por la definitiva aprobo, kiu antaŭvidas aplikon ekde 2003 aŭ 2004.*

*La Esperantologia Fakultato de KCE estos malgranda privata universitato, kiu zorgos pri la evoluigo de esperantologio ĉiudirekten: esperanto-beletristiko, historio kaj sociologio de esperantio, (inter)lingvistiko, komunikosciencoj kaj metodiko aplikitaj al esperanto. Ĝi estos strukturita laŭ katedroj (de tri ĝis kvin), kun profesoroj nomumitaj inter esperantologoj rajtaj instrui*

*en universitato; sub la kunordigo de rektoro, ili povos peti la helpon de fakuloj (nomataj docentoj) sen specifaj akademiaj rajtoj (ekzemple valoraj verkistoj aŭ pedagogoj).*

*La Esperantologia Fakultato devos produkti ne nur kursojn, sed ankaŭ tekstojn universitatnivelaĵn. Tiu-rilate ĝi signifos la plej altan investon interne al esperantio por la ĉiudirekta progreso de esperantologio.*

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj  
Gertrud EGGENBERGER, Wurbühlstr. 10  
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64  
[gertrud.eggenberger@bluewin.ch](mailto:gertrud.eggenberger@bluewin.ch)

**Novembre 10:** 36-a Gaja Esperanto-Rondo Instruisteca (GERI) en Zentrum Dreilinden en Rotkreuz.

La aranĝo GERI donas al la partoprenantoj eblecon praktike apliki esperanton. Ĝi taŭgas por gekomencantoj kaj geprogresintoj. Ĉiu profitas je interesa konversacio, nenueaj gramatikaj ekzercoj kaj distra parto.

GERI regule okazas printempe kaj aŭtune. Petu pli detalajn informojn al la prezidantino de SAEF: Gertrud EGGENBERGER, laŭ la supraj adresindikoj.

# SAT

Svisa peranto: Erna DÖRING, Postfach  
225, 4003 Basel. ☎ 061 261 70 68.

## Kio estas SAT?

La literoj SAT mallongigas la nomon de la "per"-esperanta movado Sennacieca Asocio Tutmonda.

Do, ĝi ne konas limojn. SAT naskiĝis en la jaro 1921. SAT estas unuigo de laborprenantoj, kiuj kontaktas kun la aliaj tutmonde por amikiĝi kaj interparoli pri viv- kaj labor-kondiĉoj.

La ununura komprenilo en SAT kaj inter la membraro estas la interetna lingvo esperanto.

SAT ne estas partipolitika, sed kleriga, kultura organizo.

La SAT-sidejo estas en Parizo. En la landoj reprezentas honor-ofice la asocion la landaj perantoj.

SAT aperigas la monatan gazeton *Sennaciulo*, kiu enhavas interesajn artikolojn el la mondo de la laboro, pri politiko kaj okazaĵoj mondwide. Ilin vendas la membroj mem en libera opini-esprimo.

SAT liveras ĉiun duan jaron *Adresaron*. Ĝi havas junulfakon kaj memstarajn frakciojn.

SAT observas demokratajn regulojn, estas kontraŭ rasismo kaj

diktaturo kaj respektas ĉiun pensmanieron, kiu ne estas kontraŭ la homaj bezonoj kaj vivmanieroj (humanismo).

SAT eldonas literaturajn kaj aliajn verkojn, inter kiuj estas menciinda la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV), kies nova eldono baldaŭ aperos. La vortaro estos tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, tio signifas, ke la ilustraĵoj estos enkorpigataj en la teksto mem.

Se vi deziras pliajn informojn, bonvolu skribi al la svisa peranto: Erna DÖRING, laŭ la ĉi supra adresindiko.

## Kaj pri SAT-Amikaro

Tre efika sekcio de SAT agadas en la franclinvaj landoj por diskonigi esperanton. Ĝi nomiĝas SAT-Amikaro. Ĝia 56-a kongreso, kiu okazis en Chambéry de la 14-a ĝis la 18-a de aprilo, kunvenigis pli ol 200 personoj el deko da landoj. Poŝta stampo, ekspozicio pri esperanto, ekskursoj kaj libroservo ĝin karakterizis, same kiel prelegoj. Zlatzko TISHLJAR (Slovenio) pri-traktis la temon "Identeco kaj eŭropa konscio", Désiré RABEVAZAH (Madagaskaro) parolis pri la afrika esperantomovado, André GROSSMANN instruis pri la uzo de komputilo kaj de la reto. La temo de René BALLAGUY estis la ATTAC-mov-



ado. Kaj pri eduko parolis Thierry SALADIN kaj Philippe CHAVIGNON. La postkongresa tago estis dediĉita al kolokvo pri "Multlingvismo kaj lingvo internacia" kun interveno de Michel DUC GONINAZ, Claude PIRON, Zlatko TISHLJAR kaj Désiré RABEVAZAHA kaj finiĝis per lum-bilda prelego de Bruno kaj Maryvonne ROBBINEAU, kiuj ĉirkaŭiris la mondon dum ok jaroj kaj raportis pri la utileco de esperanto.

La venontjara kongreso de SAT-Amikaro okazos aprile 2002 en Vigny (nord-oriente de Francio).

# UEA

## Universala Esperanto-Asocio Rezolucio de la 86-a Universala Kongreso:

Estas menciinda la rezolucio akceptita de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto, ĉar ĝi taŭge atentigas pri la reala rolo kaj latentaj ebloj de esperanto. Jen tiu ĉi teksto, kiu estos instigo ne nur por UEA, sed ankaŭ por ĉiuj aliaj esperanto-organizaĵoj, daŭrigi sian kuraĝan kaj avangardan aktivecon pacigan kaj homaranan.

*La 86-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Zagreb (Kroatio), de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2001, kun la temo "Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj",*

*Notinte, ke Unuiĝintaj Nacioj nomis la jaron 2001 "Jaro de dialogo inter civilizoj",*

*Memorigante, ke la esperanto-movado havas longan historion de alproksimigo de la homoj sur bazo de egaleco trans bariloj de kultura diferenco, reciproka malrespekto, kaj eĉ militaj kondiĉoj, jam de la klopodoj de Zamenhof alproksimigi la mondajn religiojn, tra la agado de Universala Esperanto-Asocio por reunuigi familiojn dividitajn en la unua mondmilito, ĝis nuntempaj elpaŝoj, kiel ekzemple la utiligo de esperanto por komunikadi inter indiĝenaj popoloj (la tiel nomataj Indiĝenaj Dialogoj) kaj por alproksimigi la korean kaj japanan popolojn,*

*Atentigas, ke*

- *kiel internacia lingvo neligita al ŝtataj aŭ etnaj interesoj, esperanto konsistigas idealan perilon de dialogo inter la kulturoj;*
- *tra pli ol cent jaroj la komunumo de esperanto-parolantoj kreis tradicion de dialogo transnacia kaj transkultura, kio plene meritas nomi ĝin dialoga kulturo;*

- *efika dialogo postulas respekton al lingva, kultura kaj idea diverseco, kaj bezonas ne nur mensan malfermitecon sed ankaŭ la kapablon aŭskulti;*
- *aldone al siaj multaj rimarkindaj atingoj, esperanto havas signifan neekspluatatan potencialon kiel dialoga lingvo.*  
*Sekve la Kongreso*
- ◆ *gratulas al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ke ili decidis lanĉi klopodojn senpere alproksimigi kaj interkomprenigi la ordinarajn homojn, sen kies konvinko la registaroj estas esence senpovaj;*
- ◆ *aparte petas al UN kaj Unesko daŭrigi tiun ĉi kampanjon preter la jaro 2001;*
- ◆ *atentigas, ke tiuj klopodoj postulas proksiman kunlaboron de NeRegistaraj Organizaĵoj;*
- ◆ *rekomendas, ke UEA proponu al UN kaj Unesko sian kunlaboron kiel organizaĵo unike bone kvalifikita por difini, en kunlaboro kun aliaj organizaĵoj, la eblojn kaj limojn de tia dialogo, kaj ĝin realigi;*
- ◆ *rimarkigas, ke efika dialogo inter diversaj kulturoj sur lingve demokratia bazo postulas prikonsideron de la bezono de nova internacia lingva ordo;*

- ◆ *apelacias al ĉiuj parolantoj de esperanto, ĉiuj lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj esperanto-organizaĵoj, kaj ĉiuj kiuj subtenas la celojn de esperanto, kunlabori en la daŭra konservado kaj plifortigo de la dialoga kulturo, kiun prezentas esperanto, kaj daŭre partopreni en la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko krei dialogon inter la civilizoj je tutmonda skalo, kiu estas esenca por la paca evoluigo de la homa socio.*

## Claude GACOND

### honora membro de UEA

Dum la malferma kunveno de la 86-a Universala Kongreso mi estis proklamita honora membro de UEA pro mia poresperanta laboro. Kvankam mi ne troviĝis en Zagreb, mi estis tuj informita pri tiu ĉi evento unue per telefonaj kaj retaj mesaĝoj. Baldaŭ sekvis poŝtkartaj gratuloj de entuziasmaj kongresanoj svisaj kaj el la tuta mondo.

Mi dankas al UEA kaj al la gratulintoj pro mia honorigo, kiun mi provos reale meriti per plua plenumo de helpa aktiveco favore al UEA, SAT, ILEI kaj SES, al kiuj mi aliĝis en 1953, do baldaŭ antaŭ



duona jarcento, kaj al CDELI, kiun mi kreis en la sesdekaj jaroj.

Kaj ankaŭ mi nelacigeble daŭrigos la verkadon de didaktikaj rendevuoj por la studentoj kaj instruantoj de esperanto. Kune ni kultivu la homaranismon, kiun la zamenhofa

lingvo disvolvas ekde sia naskiĝo. Ĝi estas humanismo respektema vehiklanta valorojn socie necesegajn en mondo sopiranta al unueco kaj demokrateco neperfortema.

Dankeme via Claude GACOND

# Loka aktiveco

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunveno: 20h00 en Salono ĉe

Halteringstrasse 97

### Raporteto

La 26-an de aŭgusto grupanoj renkontiĝis en Kaiseraugst por viziti la romian urbon Augusta raurica sub la gvido de Nicole BEROUd.

### Venontaj kunvenoj

**Septembre 27:** Nicole BEROUd prezentos Munkenon.

**Oktobre 10:** Berthe SPALINGER kaj Hans MEIER raportos pri la Universlala kongreso en Zagrebo.

## Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des gares, Genève.

### Raporto

La mardon vespere 5-an de junio deko da gesamideanoj ĉeestis la literaturan vesperon. Serioze kaj amuze ili deklamis aŭ simple laŭtleĝis poemojn kaj rakontojn, tio en gaja kaj amika etoso malgraŭ la fulmotondra kaj pluvega vespero.

### Venontaj renkontoj:

Septembre 26 je la 18h00 en UNI Dufour, salle U 259, rue Général-Dufour 24,; okaze de la eŭropa jaro

de la lingvoj, franclingva publika prelego de Claude PIRON pri la termo: *"La vérité sur l'espéranto"*. La grupo "La Stelo" eldonis kolor-informilon por anonci tiun ĉi publikan konferencon. Kiuj havas eblon ĝin dissendi aŭ disdoni al parencoj aŭ konatuloj por ilin instigi ĉeesti tiun paroladon, tiuj petu la necesan nombron da sciigiloj al Christiane SIXTUS, chemin des Mollex 15, 1258 Perly. ☎ 022 771 24 37.

Retadreso: [sixtus@freesurf.ch](mailto:sixtus@freesurf.ch).

## Kursoj:

Cours d'espéranto pour débutants et avancés, Universitl populaire deu Canton de Genève. Inscriptions: 23, rue du Vache. ☎ 339 05 00.

Konversacio en esperanto gvidata de Claude PIRON. Informas François PERRET. ☎ 320 02 71.

# Lausanne

## Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

## Venontaj kunvenoj

Jen la datoj de la venontaj kunvenoj: oktobre 1; novembre 5; decembre 16: Zamenhofa festo; 2002 januare 7; februare 4: Ĝenerala asembleo.

## Ekspozicio ĉe Migros

Dum pli ol tridek tagoj okazis ekspozicio pri esperanto en la lokoj de "Ecole Club Migros" en Lausanne. Multaj vizitantoj informiĝis pri la lingvo internacia, ĉu kiel eksterinformitoj, ĉu kiel kursanoj de la lernejo Migros mem. Poste, ses personoj aliĝis kiel komencontoj kaj kvin partoprenis la kvin vesperajn kursojn duhorajn. Migros konsentis reskribi la kursproponon en la venonta programo dumvintra de "Ecole-Club" en Lausanne.

François RANDIN

## Bona artikolo

Ankaŭ menciindas bona artikolo de Joëlle FABRE titolita *"L'espéranto sort du bois"*, kiun interrete publikigis la gazeto *"24 heures"* kun foto de François RANDIN montranta esperanto-librojn.



## Esperanto-kurso de Stéphane Keller ĉe EPFL

Miaj gelernantoj sekvis la esperanto-kurson kun vigla intereso kaj entuziasmo. Fine de la unua serio ni estigis bonajn bazojn por la daŭrigo. Ni fondis la societeton Esperanto-Grupo EPFL, kiu estos oficiale agnoskita de la altlerneja estraro. Kreiĝis la reta dissend-adreso [epfl@esperantio.net](mailto:epfl@esperantio.net) kaj kontaktoj pere de ĝi bonvenas.

Ĝis nun membras en la grupo (kaj en la reta dissendlisto) ok personoj, kvar (eks)gekomencantoj, tri progresantoj kaj mi mem.

Dum la bonveniga tago por la novaj studentoj, komence de oktobro, ni disponos je budeto en EPFL, kiel la aliaj societoj de la altlernejo. Ni informos pri esperanto, anoncos enkondukan prelegon kaj varbos por la kurso. La postan semajnon povos okazi la enkonduka prelego, kiun sekvos la regula kurso-serio. Ni anoncos la prelegon kaj la kurson ankaŭ en UNIL kaj alimedie.

Inter la unuaj prelegontoj estas listigitaj Claude GACOND kaj Claude PIRON.

Stéphane KELLER

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo  
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke  
☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Tre sukcesa ekskurso

La bone preparita kaj alloga programo de Anĝelo MELLINI 'kulpis', ke 17 geekskursantoj ĝuis tre belan, instruigan kaj amuzan tagon la sabaton 30-an de junio. Aŭtomobile ni renkontiĝis ĉe la bestoparko Roggenhausen (Aarau), kie kaleŝo tirita de tri(!) ĉevaloj atendis nin por komforte traveturi la belan parkon, hejmo ĉefe por multaj diversaj cervospecoj, kaj ankaŭ por muflonoj, montokaproj, valezaj ŝafoj, aproj kaj ibeksoj, kies ĉarmaj idoj ricevis multe da admiro. Dum bestoflegisto respondis al multflankaj demandoj de la plenkreskuloj, la infanoj amuzis sin en vasta ludejo, ĝis kiam ĉiuj denove kunvenis por la pikniko kun kradrost-ajoj.

Granda surprizo atendis nin posttagmeze, kiam la kalesoveturantoj kaj la aŭtomobilantoj alvenis ĉe 'Käpten Jo's', restoracio en formo de ŝipo, apud la rivero Aare en Biberstein. La ŝipo proponas krom trinkaĵoj kaj manĝaĵoj multajn amuzajojn. Ni ekzemple travivis fortan maran ŝtormon en la kareno kaj admiris submaran pejzaĝon per la helpo de akvokloŝo. Muzeo kun naŭtikaĵoj donis impreson pri la interesa, sed ofte malfacila vivo de maristoj.

Krom ĉio tio kompreneble la kamaradeco ludis gravan rolon, malmulte da krokodilado, multe da babilado kaj ridado regis. Dank'al Anĝelo la LES-anoj spertis kelkajn gajajn horojn en bona verda etoso.

Sonja BRUN.

### Venontaj kunvenoj

**Oktobre 18:** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: Historio kaj fabrikado de salo kun Annelis DETLING.

**Novembre 07:** en Simplon.

**15:** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: kompilado de la programo 2002.

**Decembre 05:** merkrede 14h00-16h00 en Simplon: Zamenhofa posttagmezo kun Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN.

**2002 Januare 09:** en Simplon.

**18:** vendrede 19h30: paroliga leciono, 20h00: Vojaĝo tra Venezuelo kun Margrit E. BRÜGGER.

## Kantono de Neuchâtel

Studaj rondoj ĉe CDELI  
La Chaux-de-Fonds

### Studrondo

La studrondo reokazos post la oktobraj ferioj ĝenerale la 2-an kaj 4-an mardon de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND. Interesatoj notu kaj rezervu la sekvajn datojn:

**Novembre 13 kaj 27.**

**Decembre 11.**

**2002 januare 8, 22.**

**Februare 12.**

**Marte 12.**



# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500  
Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je  
la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse  
1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Oktobre 3:** Temo elektota.

**Novembre 7:** Esperanta gazet-  
aro kun Stanislaw POCHANKE.

**Decembre 5:** Zamenhofa  
Vespero.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH  
☎ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an mardon de la monato je  
la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazien-  
strasse 6, 8008 Zürich.

## Grava informo

Ŝanĝiĝis la tago por la  
monataj kunvenoj de lundo al  
mardo, ĉar pluraj personoj  
plendis, ke la lundo malbone  
taŭgas.

**Septembre:**

(En septembro 2001 ne okazos la  
monata kunveno, ĉar jam abundas  
aliaj aktivecoj.)

**Merkredon 26:** 19h30 – 23h00:  
Granda salono de Hotelo Krone  
Unterstrasse: Publika aktiveco  
okaze de la internacia tago de la  
lingvoj. Podia diskuto kun diversaj  
representantoj el politiko ekonomio,  
eŭropaj movadoj ktp. pri la lingva  
politiko kaj la lingvaj problemoj.  
(Tre grava evento, amasa parto-  
preno dezirinda).

## Oktobre

**Marde 9:** Monata kunveno.

19h30: konversacia rondo por  
ekzerci la lingvon.

20h00: prelego pri la propedeŭtika  
valoro de esperanto.

**Ĵaŭde 25:** 18h15-20h00: Komenco  
de esperanto-kurso por komencantoj  
(poste regule dum 10 ĵaŭdoj vespere  
ĝis januaro 2002).

**Vendrede 26:** 20h15-22h00:  
Komenco de Salso-kurso (kuba  
danco) por komencantoj (poste  
regule dum 6 ĵaŭdoj vespere ĝis  
decembro 2002).

## Novembre

**Marde 13:** monata kunveno:

19h30: konversacia rondo por  
ekzerci la lingvon.

20.00: prelego kaj analizo pri la  
temo "vendado de esperanto".

**Decembre:**

Sabate 8 kaj dimanĉe 9:

German-svisa Kultura Semajnfino kaj Zamenhofa festo. (Detala programo en la venonta numero de "SES informas".

# Mortoj

Artikoloj de Claude Gacond

## Denise MATTHEY

La maja letero de la grupo "*Jura-Zürich*" de la asocio JEAN anoncis, ke Denise MATTHEY mortis la 7-an de majo en sia centa jaro. Ni menciui, ke post la morto de Edmond PRIVAT en 1962 tiu esperantistino multe helpis al Yvonne PRIVAT por la ordigo de la arkivaĵoj Edmond PRIVAT donacitaj al la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.

## Amalie VEITH-SCHÜMPERLI

1911 februare 1 – 2001 majo 16

Amalie SCHÜMPERLY naskiĝis kaj ĉiam loĝis en Aarau. Post sia edziniĝo ŝi konatiĝis kun SAEF-anoj en 1952 kaj lernis esperanton per kurso gvidata de Hans HUNKELER. Ŝi aliĝis al SAEF, kies GERI- kursojn en Luzern ŝi regule frekventis ĝis aprilo 1999, do ĝis ĵus antaŭ sia re-

tiriĝo en la maljunulejo Golatti, kie ŝi mortis.

Ekster la SAEF medio ŝi ankaŭ partoprenis aranĝojn de SES, interalie feri-kursojn en Münchenwiler organizitaj de William PERRENOUD. En la asembleoj de SES ŝi ŝatis aŭskulti la paroladojn Edmond PRIVAT, kies verkojn ŝi relegadis. Ankaŭ Universalajn Kongresojn ŝi frekventis, kaj plurajn staĝojn de KCE, kiun ŝi vigle subtenis finance.

Unu el la hobiaj de Amalie VEITH estis la pentro de akvareloj en la naturo, kaj okaze de siaj ekspozicioj ŝi ŝatis munti standeton pri esperanto por atenti pri sia alia ŝat-okupo.

## Fritz LIECHTI

1913 aŭguste 10 – 2001 majo 23

Fritz LIECHTI naskiĝis la 10-an de aŭgusto 1913 en Steffisburg (BE). Ekde kiam li profesie deĵoris kiel oficisto de radiotelegrafado, flug-kontrolado kaj aertrafika informado por la pilotoj en la flughaveno Kloten (nuna nomo: Swisscontrol), li instaligi en Zürich. De 1964 ĝis 1978 li estris la internacian informan servon por pilotoj, kiun li kunfondis.

Fritz Liechti lernis esperanton en 1944 en Rheineck (SG). En 1950 li aliĝis al la zurika Esperanto-Societo, kiun li prezidis de 1964 ĝis 1992. De 1947 ĝis 1950 li prezidis



SESn, kiu elektis lin honora membro en 1974. De 1986 ĝis 1994 li ree apartenis al la Centra Komitato de SES plenumante la funkcion de vicprezidanto. En 1991 li transprenis la redaktadon de la nova organo "*Svisa Esperanto-Societo informas*", kiun la prezidanto Claude GACOND lanĉis, kiam paneis la eldono de la organo "*Svisa Esperanto-Revuo*", kaj li efike plenumis sian taskon de redaktoro ĝis 1896.

Fritz LIECHTI fondis en 1951 la svisan sekcion de Kristana Esperantista Ligo Internacia kaj eldonis la informilon "*Kristana Bulteno*" de 1951-77 helpata de sia edzino Hanny LIECHTI-KILCHHOFER (1914-1999). Ankaŭ kun sia edzino li organizis 4 internaciajn KELI-kongresojn en Svislando inter 1953 kaj 1977.

Dank'al la kunlaboro de Fritz LIECHTI, kiu prezidis la ekzamenan komitaton de SES kaj akceptis transpreni la gvidadon de superaj kursoj de esperanto, SAEF organizis inter 1970 kaj 1977 tre sukcesajn Internaciajn Eŭropajn Semajnojn en Fürigen, Magliaso kaj Wengen kun kvindeko da partoprenantoj

Kulmino de sia esperanto-kariero travivis Fritz LIECHTI kadre de sia filatelista aktiveco. Kun la piloto Bruno ROHR li ne nur flugigis la varmaeran balonon "*Esperanto*",

sed li ankaŭ sukcesis eldonigi svisan poŝtmarkon de 70 centimoj fare de la svisa poŝto honore al tiu esperanto-balono kaj al la 64-a Universala Kongreso de Esperanto. Dum la bapta poŝtflugo de la balono, kiu startis el Gossau (ZU) en 1976 transportiĝis 2500 filatelaj lanĉ-kovertoj, kiuj kontribuis al la sukceso de la agado.

Sekve al esperanto-kurso, kiun li gvidis en 1978 kadre de la svisa sekcio de la Eŭropa Federista Partio Fritz LIECHTI eldonis en 1983 perkasedan esperanto-kurson.

## Cosette SANDOZ-GIROUD

1933 januare 24 – 2001 aŭguste 15

Cosette GIROUD naskiĝis kaj ĉiam loĝis en La Chaux-de-Fond, krom dum periodo de helplaboro en Afriko kadre de Civila Servo Internacia. Ŝi eklernis esperanton la 2-3-ajn de junio 1956 okaze de Semajnfino de Esperanto-Junularo de Svislando, kiun ŝia fratino Andrée GIROUD organizis kun sia amiko Claude GACOND en la vilaĝo La Sagne, kie ambaŭ estis instruistoj. La saman jaron Cosette jam kunorganizis la unuan skiferion en Adelboden. Tiun ĉi vintran skiaranĝon por esperanto-parolantoj ŝi tre aktive fidelis eĉ kun sia edzo Raoul COP, kiun ŝi ekkonis en Alĝerio.

Aliĝinta al UEA, kies dumviva membro ŝi fariĝis, kaj ankaŭ al SAT, Cosette GIROUD partoprenis plurajn kongresojn kaj migradis en Pollando kaj Jugoslavio okaze de junularaj renkontoj.

Trapasinte la klasikan abituriantan ekzamenon Cosette GIROUD volis eniri la superan teknikan lernejon en La Chaux-de-Fonds. Sed tiam montriĝis, ke tiu altlernejo estis rezervita al knaba publiko. Tial Cosette fariĝis dommastruma instruistino, sed ankaŭ batalema politikistino kadre de la social-demokrata partio. Kiam fine la virinoj akiris sian voĉdonrajton, ŝi estis elektita en la decidpova konsilantaro de La Chaux-de-Fonds de 1969 ĝis 1972. Ekde sia retiriĝo el la koncerna konsilantaro, havante pli da libera tempo ŝi ĉiumerkrede helplaboris ĉe CDELI.

Post amika divorco Cosette edzinigis al André SANDOZ, kiun ŝi esperantigis. Kun li ŝi aktivis favore al la defendo de la monto Mont-Racine kontraŭ atencoj de la armeo celanta fari el ĝi militekzercejon. Ŝi plenumis la funkcion de kasisto de la asocio defedanta tiun ĵurasan supron, kiun ŝi tiom ŝatis. Kaj la fato volis, ke ĝuste sur tiu ĉi monto ŝi subite mortis pro kardihalto admirante la alpan panoramon.

# Interrete

## Interesa diskutrondo

La interreta diskuta rondo [Bjajlisto@helsinki.fi](mailto:Bjajlisto@helsinki.fi), kiun gvidas la lingvisto Jouko LINDSTEDT el Helsinko, estas instruiga por tiuj, kiujn interesas la nunaj lingvaj problemoj kaj la esperanta lingvo-fenomeno mem.

En mesaĝo dissendita la 22-an de aŭgusto Jouko LINDSTEDT interese komparas la kulturajn eblojn de la lingvoj angla kaj esperanta. Jen citaĵo iom resumita el tiu ĉi teksto pri-pensiga:

*Oni devas principe distingi inter la ĝenerala bezono de internacia komunikilo, kaj la fakto, ke pro la relativa forteco de Usono en Eŭropo kaj Ameriko post la Dua Mondmilito, kaj parte pro la sekvoj de la Brita Imperio en aliaj mondpartoj, la angla lingvo sin proponis kiel la malplej maltaŭgan kandidaton. Poste la procezo simple nutras sin mem: ĉar la angla estas forta, oni lernas ĝin ĉie, kio siavice igas ĝin ankoraŭ pli forta kaj lerninda. Aliflanke, tio kompreneble ankaŭ malfermas novajn kanalojn por la politika kaj kultura influo de la anglalingvaj ŝtatoj, sed tiu influo ne estas la sola (eĉ ne la ĉefa pela forto).*



La tradicia argumento pri la facileco de esperanto kaj la malfacileco de la angla tre malmulton signifas en ĉi tiu procezo. Estas pli facile lerni stiri biciklon ol aŭton, sed tamen la homoj aĉetas aŭtojn pro ties pli vasta uzebleco. Lernofacileco ne estas absoluta valoro, sed relativa je tio, kion oni povas atingi per la investita peno.

Kompreneble restas la problemo, ke la uzo de la angla nejuste favoras denaskajn parolantojn de tiu lingvo. Ili estas ekzemple pli valoraj laborantoj en diversaj internaciaj firmaoj kaj organizaĵoj. Tio povus eventuale ŝanĝiĝi, se la ne-denaskaj uzantoj de la angla pli kuraĝe decidus, ke ilia propra normo de la angla ne bezonas egali al tiu de la denaskaj parolantoj. Kompreneble la anglalingvaj landoj mem kontraŭbatalas tiun ŝanĝon, ĉar ili enspezas multe da mono kaj influo (ekonomia kaj spirita kapitaloj) per la instruado de la angla.

La argumento pri esperanto kiel "neŭtrala" alternativo ne vere atingis la publikon, ĉar oni emas rigardi la vortaron (anstataŭ la gramatiko) kiel la vizaĝon de la lingvo, kaj la vizaĝo de esperanto estas tre eŭropa, eĉ tre latinida. (Kaj pluraj el niaj propraj verkistoj emas pli-latinigi ĝin.) Ni devus trovi manierojn pli efike klarigi, ke

tamen esperanton ĉiulingvano povas fari sian propran lingvon alimaniere, ol la anglan.

La problemo pri la angla kiel internacia lingvo ne estas la usona kaj aliaj anglalingvaj kulturoj en si mem, sed tio, ke ilia ekzisto blokas la ekeston de alia, vera internacia kulturo. Oni povas lerni la anglan por utiligi ĝin praktike, sed ne por fariĝi anglalingva verkisto. Tamen, ankaŭ tio ne estas absoluta vero, ĉar en Afriko kaj Barato troviĝas grava anglalingva literaturo de nedenskuloj. Por la tuto de la anglalingva kulturo ĝi tamen malmulte signifas. Lernolibroj instruas la anglan kiel internacian lingvon, tamen ili devas samtempe instrui pri la britaj kaj usonaj naciaj moroj, festoj kaj apartaĵoj, ĉar aliajn la angla ne portas.

Oni povas do diri, ke la angla portas "malriĉan" tutmondiĝon, kiel nura helplingvo – eĉ se ege ofte ege utila – kaj esperanto portas "riĉan" tutmondiĝon, kie vere ekestas iu kultura tavolo surbaze de egalaj etnaj kulturoj. La aserton tamen relativigas la fakto, ke la anglan oni ofte uzas por kultura interŝanĝo, kiu neniel rilatas al la landoj anglalingvaj, kaj aliflanke en la esperanta kulturo ankoraŭ mankas la kontribuo de kelkaj grandaj mondkulturoj, precipe la islama

# Esperanto? – Ja!

(Diese Beilage ist für Interessenten und Gönner bestimmt, die diese Sprache (noch) nicht kennen, aber dazu ja sagen)

September 2001

## Das Europäische Sprachenjahr 2001 – nur Wunschbild?

Der Europarat, unterstützt von der Europäischen Union, hat das Jahr 2001 zum Europäischen Sprachenjahr erklärt. Die Esperanto-Bewegung schliesst sich dieser Initiative an, weil viele Gemeinsamkeiten bestehen.

### Wohin zielt das Europäische Sprachenjahr?

Die Zielsetzung ist hoch, ja unerreichbar, entspricht fast einem Wunschbild.

- Erhöhung des Bewusstseins über die sprachliche Vielfalt in Europa.
- Motivation zum lebenslangen Lernen von Sprachen, selbst der weniger verbreiteten

Die Bürger Europas sollen zwei oder mehr Fremdsprachen kennen. Das Europäische Sprachenjahr will auch Verständnis und Toleranz zwischen den Kulturen wecken. Im Visier stehen auch die demokratische Ausgestaltung Europas, die Mobilität und die Beschäftigung.

Die vielsprachige Schweiz mit den vier Amtssprachen könnte als Modell dienen. In grossen Ländern wie Deutschland, Frankreich, England hat das Sprachenlernen weniger Tradition. Und wer kann sich schon in zwei Fremdsprachen gut ausdrücken?

### Die Wirklichkeit schockiert

Gerade der Europarat und die Europäische Union, die elf Amtssprachen kennt, geben ein schlechtes Beispiel. Im internen Verkehr werden wenige Arbeitssprachen verwendet, meistens Englisch und Französisch. Die sprachliche Gleichberechtigung ist weitgehend Schein und kann kaum



sichergestellt werden. Es ist zuwenig bewusst, dass diese Sprachenregelung sehr undemokratisch ist.

Die kleinen Sprachen stehen im Schatten der grossen und kämpfen um ihre Existenz. Was uns aber beunruhigen müsste, ist das Vordringen des Englischen, das andere Sprachen regelrecht verdrängt. Ironischerweise spricht man von Denglisch, Franglais, Swinglisch. Die Wirtschaft und die internationalen Unternehmen leisten dieser Entwicklung Vorschub. Frühenglisch an unseren Schulen ist die Konsequenz und die Problematik zugleich. Wann schlägt das Pendel zurück?

Bei dieser Situation und Entwicklung erweist sich das Europäische Sprachenjahr als höchst aktuell und dringend. Es wäre zu wünschen, dass es nicht nur beim Aufruf bleibt.

## Die Kampagne läuft

In der Schweiz koordiniert das Sekretariat der kantonalen Konferenz der Erziehungsdirektoren die Arbeiten. Die Mittel und das Interesse sind beschränkt.

Es beteiligen sich vorab Institutionen, die sich einen Vorteil erhoffen: Der kulturelle Dienst ausländischer Botschaften, die Stiftung Sprachen und Kulturen mit der Zeitschrift *Babylonia*, die dem Sprachenjahr eine Sondernummer gewidmet hat, weiter die ch Stiftung, die Lia Rumantscha, die Pro Helvetia, der Verein Schweiz. DeutschlehrerInnen, die zweisprachige Stadt Biel, um nur einige zu nennen. Im Laufe des Jahres finden verschiedene Aktionen und Veranstaltungen statt.

Ein besonderer Beitrag der Schweiz ist die Erarbeitung des Europäischen Sprachenportfolios. Es orientiert sich an dem vom Europarat entwickelten gemeinsamen europäischen Referenzsystem für das Sprachenlernen, ein international vergleichbarer Massstab über Sprachkenntnisse. Der Sprachenpass gibt einen Ueberblick über den Stand von Sprachkenntnissen und die entsprechenden Zertifikate und Kursbestätigungen. Die Lernbiografie dokumentiert die Geschichte des Sprachenlernens. Das Dossier sammelt persönliche Arbeiten.



## La kampanjo rulas

Das Europäische Sprachenjahr ist auch eine Chance für Esperanto, auch wenn der Europarat kaum daran gedacht hat. Die Esperanto-Bewegung identifiziert sich mit den gesteckten Zielen und macht seit Jahrzehnten auf die Sprachenproblematik aufmerksam.

Der Esperanto-Weltkongress in Zagreb (21.-28.08.2001) diskutiert das Thema: Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj. Der Esperanto Jugendkongress in Strassburg (29.07.-05.08.2001) befasst sich mit der Mehrsprachigkeit in Europa. Am Europatag der Sprachen, 26. September, hält der Esperanto-Schriftsteller Claude PIRON in der Universität Genf, rue Général Dufour, einen öffentlichen Vortrag über „La vérité sur l’espéranto“.

Der Esperanto-Weltbund mit Sitz in Rotterdam ruft in einem Flugblatt auf, weniger bekannte Sprachen und jene der Nachbarn zu lernen. So begegne man neuen Kulturen und lerne sie schätzen. Eine Sprache, die eindeutig zu leichterem und gleichberechtigter Kommunikation führe, sei die internationale Sprache Esperanto.

## Was Esperanto mit dem Sprachenjahr verbindet

Man kann füglich behaupten, dass Esperanto in allen Ländern Europas gesprochen wird, von einer Minderheit natürlich. Die Esperanto-Sprechenden bilden eine Art Diaspora und sind einander sehr verbunden.

Esperanto ist eine der europäischsten Sprachen. Der Begründer, Dr. Ludwig ZAMENHOF, schuf die Wörter aus dem Französischen, Englischen, Deutschen, auch aus slawischen Sprachen und dem Latein, wobei der romanische Bestandteil überwiegt. Die regelmässige Grammatik und der internationale Wortschatz sind seine Stärken.

Esperanto vermittelt interkulturelle Erfahrungen und macht internationales Zusammenleben persönlich erlebbar, weil es ethnische Grenzen überspringt. Der Slogan des Sprachenjahres „Sprachen öffnen Türen“ erfüllt sich.

Bruno GRAF